

Manifestacioj ĝis aŭgusto 1970, 2-a parto, kaj iom da statistikoj
Claude Gacond, 343-a radioprelego, 1970.05.05 & 09

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni provis listigi la esperantistajn manifestaciojn : kongresojn, kulturajn aranĝojn, feriojn, kiuj povas allogi okcident-eŭropanojn. Por la monato majo ni registris 3 manifestaciojn. Por junio 2, por julio 13 kaj por aŭgusto 3. Pluraj el ili daŭras dum la tuta somero. Nun ni menciuj aliajn manifestaciojn, kiuj komenciĝos en aŭgusto kaj en la sekvantaj monatoj.

A.- Unue inter ili ni menciuj la 55-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazos de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto en Vieno, Aŭstrio. En aprilo UEA jam anoncis 1237 aliĝintojn. Ĉirkaŭ tiu kongreso okazos plej diversaj manifestacioj turistaj, kulturaj aŭ ripozigaj.

Cl.- Ni menciuj la 11-an Internacian Infankongreseton, kiu okazos ankaŭ en Vieno dum la sama semajno. Ĝi estas rezervita al infanoj de 6 ĝis 13 jaroj, kiuj flue parolas esperanton. Tiuj infanoj loĝos en la Kulturejo Hörndlwald. Parkoj, terasoj, naĝejo, salonoj, ludejoj, studejoj ebligas varian programon.

A.- Ĉiam en la sama semajno okazos Internacia Feriosemajno en Kniebis, Nigra Arbaro, Okcidenta Germanio. Ĝin organizas la Natur-amikoj.

Cl.- Alian renkontiĝon aranĝas la natur-amikoj. Ni forgesis registri ĝin por la monato julio. Pro tio ni nun raportas pri ĝi. Temas pri la Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Naturamikoj en Abaliget, Hungario, de la 18-a ĝis la 28-a de julio. En la programo estas diversaj ekskursoj, prelegoj, festoj.

A.- De la 8-a ĝis la 15-a de aŭgusto okazos en Graz, Aŭstrio, la 26-a Internacia Junulara Kongreso. La ĉeftemo de tiu kongreso estos la Lernejo.

Cl.- En Svislando okazos la 12-a Eŭropa Feriosemajno de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto. Ĝin organizas Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj. Ĝi disvolviĝos en Gwatt sur la bordo de la lago Thun, en Oberland.

A.- De la 29-a de aŭgusto ĝis la 5-a de septembro la fervojistoj aranĝos feriotagojn en Nederlando kun multaj ekskursoj.

Cl.- Por la monato septembro ni menciuj la 41-an Italian Kongreson de Esperanto, kiu okazos de la 19-a ĝis la 26-a de septembro sur Mediteranea Maro. La kongresejo estos la ŝipo Caribia, kiu enhavas 27 kunvenejojn, 3 restoraciojn, 3 orkestrojn, 4 naĝejojn kaj klimatizitajn kajutojn. Haltoj okazos en Genova, Cannes, Barcelona, Palma de Majorca, Bizerte (Tunis), Palermo kaj Capri (Napoli) kaj ree Genova, kie komenciĝos kaj finiĝos tiu originala kongreso. La italaj fervojoj konsentas 20 procentan rabaton por la vojaĝo al Genova.

A.- En oktobro ni menciuj la aŭtunajn feriajn esperanto-kursojn en altlernejo de Arhus, Danlando. Tiun manifestacion ni rekomendas al la komencantoj, kiuj deziras bone studi esperanton. Datoj : 18-a ĝis 24-a de oktobro.

Cl.- Observante la esperanto-vivon en Svislando ni konstatis, ke la esperantistaro estas tre supraĵe informata pri la diversaj esperanto-manifestacioj. Nur la plej aktivaj esperantistoj, kiuj estas individuaj membroj de UEA aŭ kiuj abonas la gazeton *Heroldo de Esperanto* antaŭscias, kio okazos en Esperantio. Por provi lukti kontraŭ tiu manko de informado ni komencis sisteme registri la manifestaciojn okazantajn en Svislando kaj en okcidenta Eŭropo. Tiujn informojn ni aperigas en nia informilo *Svisa Espero*, kaj je la dorsa flanko de tiu gazeteto ni malfermis rememorigan rubrikon, kiu estas titolita *Nia Kalendaro*.

Manifestacioj ĝis aŭgusto 1970, 2-a parto, kaj iom da statistikoj
Claude Gacond, 343-a radioprelego, 1970.05.05 & 09

A.- Tiu kalendaro donas laŭ datvico la titolojn de la manifestacioj kun mencio de la numero de *Svisa Espero*, kie aperis pli detalaj informoj.

Cl.- Ni esperas, ke tio helpas la svisojn partopreni esperanto-aranĝojn. Almenaŭ nun ili scias, ke manifestacioj multnombre disvolviĝas en plej diversaj lokoj.

A.- Ni ne scias, ĉu ekzistas statistikoj pri la esperanto-manifestacioj. Estus interese scii, kiom da aranĝoj okazas ĉiujare, kaj kiom da partoprenantoj ili gastigis. En tiu listo oni devus nombri nur la manifestaciojn, kie oni tranoktas.

Cl.- Per tiuj statistikoj oni povus vidi, ĉu la nombro de la manifestacioj kreskas aŭ ne. Ĝis nun pro ilia manko oni malfacile povas taksu la vigecon kaj aktivecon de la esperanta vivo. Ŝajnas al ni, ke tiuj statistikoj ne estus pli malfacile akireblaj ol tiuj pri la esperanto-gelernantoj. Kaj ili eble estus same utilaj al ni.

A.- Antaŭ kelkaj jaroj ni provis teorie registri la nombron de la partoprenintoj al manifestacioj. Ni listigis kvindek da manifestacioj, kies nomojn kaj datojn ni trovis en *Heroldo de Esperanto*. Laŭ la raportoj ni konstatis, ke la nombro de iliaj partoprenintoj situis inter 50 kaj 200, escepte por la Universala Kongreso kaj kelkaj maloftaj manifestacioj, kies partoprenantaro superas tiun normon. Forprenante la Universalan Kongreson kaj kalkulante po 100 personojn por manifestacio, ni ricevas sumon de 5'000 partoprenintoj ekster la Universala Kongreso. Do kun la Universala Kongreso ni povas diri, ke ĉiujare meznombro 7'000 personoj partoprenas internaciajn kongresojn, kie esperanto estas la sola aŭ ĉefa lingvo (ni ne forgesu la krokodiladon).

Cl.- Ŝajnas al ni, ke la nombro de kongresoj ne multe varias de jaro al jaro. Ekzistas la samaj societoj, kiuj kutime aranĝas la samajn manifestaciojn. Kelkaj aranĝoj ĉesas. Aliajn oni iniciatas.

A.- Kio malhelpas la kreskon de tiuj nombroj ?

Cl.- Unuflanke tio estas, ke la esperantistaj aranĝoj ĉefe dependas de la sindonemo de kelkaj aktivuloj. Ofte la kongres-kotizo ne permesas salajri la organizantojn. UEA nun provas kovri siajn kongresajn elspezojn per pli altaj enpagoj. Ĝi tute pravas, kaj malpravas la grumblantoj, ĉefe se ili venas el landoj nomataj nepagipovaj. Ekzemple grumblas en la aprila revuo *Esperanto* de UEA polo nomata Stanislaw Rudnicki, kiu trovas, ke la Universala Kongreso fariĝas profitdona entrepreno por UEA. La redaktoro prave respondas, ke tiu ideo estas malĝusta. UEA kovras siajn elspezojn.

A.- Aliflanke malhelpas la kreskon de la kongresoj ĝuste la ekzisto de la nepagipovaj landoj. Kiom da poloj, hungaroj, rusoj, jaron post jaro ne povas partopreni esperanto-aranĝojn, ĉar ili ricevis nek elir-permeson, nek eblecon transpigi kongres-kotizon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-